

# Eŭropa Bulteno

Januaro 2014, Numero 134

## ŜTATPREZIDANTO DE KROATIO AŬSPICIOS LA ĈIJARAN EEU-KONGRESON



La kroatia ŝtatprezidanto Ivo Josipović akceptis esti aŭspicianto de la 10-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Rijeka ĉi-jare. Jen la traduko de lia letero sendita la 21-an de januaro 2014:



Estimata sinjoro Tišljar,  
Kun granda plezuro, mi akceptas la aŭspicion super la 10-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU), kiu okazos de la 6-a ĝis la 12-a de julio 2014 en Rijeka.  
Mi utiligas ĉi tiun okazon por deziri al vi kaj viaj kunlaborantoj sukcesan organizon de la konferenco kiu per sia temo pri justaj lingvaj rilatoj en Eŭropo certe allogos fakan kaj pli vastan publikon.  
Al la membroj de Kroata Esperanto-Ligo mi deziras multan sukceson en la laboro sendante sincerajn salutojn.

Estime via,  
Prezidanto de Respubliko Kroatio:  
Ivo Josipović

## ALIAJ NOVAĴOJ PRI LA KONGRESO

La kongresprogramo jam estas preskaŭ plene finprizorgita. Finiĝis la preparoj pri la antaŭkongreso, pri kiu vi povas trovi bazajn informojn kaj detalojn ĉe la kongresa paĝaro: <http://eeu-kongreso.webnode.com//>. Ĝis nun aliĝis 52 kongresanoj el 13 landoj. La sekva rabatita limdato por aliĝi estas la 31-a de marto.

### Provizora programo de la 10-a Eŭropa Esperanto-kongreso de EEU en Rijeka

**Dimanĉo**, la 6-an de julio 2014

12-20a horo: Akcepto de la kongresanoj

12-19-a horo: Kroata Tago (programo por kroataj esperantistoj)

20,00-21,30 horo: Folkloro muzikprogramo de la folkloro grupo el Rijeka



**Lundo**, la 7-an de julio 2014

Granda salono:

10-12 horo: Solena malfermo de la kongreso

14-15 horo: Kongrestema prelego: Seán Ó Riain (prezidanto de EEU)

15-16 horo: Kongrestema prelego: Milorad Pupovac (parlamentano de kroatia parlamento, universitata profesoro)

16-17 horo: Kongrestema prelego: Ivo Žanić (universitata profesoro el Zagrebo)

17-18 horo: Aliaj prelegoj: Vjekoslav Morankić (membro de LKK kaj ekonomikisto)

10-21,30 horo: Teatro UMS el Svislando prezentas rokoperon en Esperanto

Malgranda salono:

16-18 horo: Filmoj diversaj en Esperanto kaj subtitolitaj

Tria salono:

10-18 horo: Libroservo

**Mardo**, la 8-an de julio 2014

Granda salono:

10-12 horo: Unua kundiso de la Asembleo de EEU (fermita, nur por la assembleanoj kaj anstataŭantoj)

14-15 horo: Kongrestema prelego: Jagoda Granić, universitata profesorino el Split

15-16 horo: Kongrestema prelego: Nikola Rašić (estrarano de EEU)

16-17 horo: Aliaj prelegoj: Zlatko Tišljar (estrarano de EEU) Zagreba Metodo instrui Esperanton

17-18 horo: Aliaj prelegoj: Spomenka Štimec (sekretariino de Kroatia E-Ligo)

20-21,30 horo: Koncerto de popularaj operarioj en Esperanto de Neven Mrzlečki

Malgranda salono:

10-12 horo: prezento de novaj libroj (gvidas: Spomenka Štimec)

16-18 horo: Filmoj diversaj en Esperanto kaj subtitolitaj

Tria salono:

10-18 horo: Libroservo

**Merkredo**, la 9-an de julio 2014

8-19 horo: TUTTAGA EKSKURSO (se eblos ni provas organizi ŝipekskurson al Kvarneraj insuloj sed tio momente ankoraŭ ne certas)

Granda salono:

20-21,30 horo: teatraĵoj plenumataj de Saša Pilipović kaj Georgo Handzlik

**Ĵaŭdo**, la 10-an de julio 2014

Granda salono:

10-12 horo: Dua malfermita kunsido de la asembleo de EEU: strategio por Esperanto en EU

14-15 horo: Aliaj prelegoj: Heidi Goes: Pri la indonezia lingvo kaj ties evoluo kiel ŝtata lingvo de Indonezio

15-16 horo: Aliaj prelegoj: Velimir Piškorec: Universitata instruado de Esperanto en Zagreba Universitato

20-21,30 horo: Koncerto je marimbo de Kaja Farsky

Tria salono: 10-18-a horo: Libroservo

ALILOKE:

13-19 h: Duontaga ekskurso tra Rijeka kaj ĉirkaŭaĵo

**Vendredo**: la 11-an de julio 2014:

Granda salono:

10-12 horo: Publika debato pri eblaj poresperantaj agadoj loknivele en la moderna tempo

14-15 horo: Faka kunsido EDE

15-16 horo: Faka kunsido E@I kaj ĝiaj agadoj


16-17 horo: Eŭropaj federaciistoj

17-18 horo: Festkunsido de Asocio de Verduloj Esperantistoj okaze de 30-jariĝo

20-21,30 horo: Koncerto de la Zagreba grupo Druyd

Tria salono:

10-18 horo: Libroservo



Aliloke:

14-18 horo: vizito al nova moskeo en Rijeka

**Sabato**, la 12-an de julio: 2014

Granda salono:

10-12 horo: Solena fermo

Tria salono:

9-12 horo: Libroservo

Maja Tiŝljar

## ESPERANTISTA MOVADO FINE EKZISTAS EN ĈIUJ EU-LANDOJ – FONDITA KIPRA ESPERANTO-UNIO

La 22-an de januaro 2014, estis registrita ĉe notario en Limassol, Kipro, la senprofitcela asocio Kipra Esperanto-Unio, kies adreso estas ĉe la nuna reprezentanto Roberto Pigo, [esperob79@gmail.com](mailto:esperob79@gmail.com). KEU komencis ellabori ankaŭ sian paĝaron: [www.keu2014.weebly.com](http://www.keu2014.weebly.com).



En mia E-kurso estas proksimume 15 lernantoj. Ĉiuj fariĝos membroj de la nova asocio. Estus bele sendi iujn el ili ĉi-somere al Slovacia SES, sed - kiel konate - Kipro travivas malfacilan momenton pro la ekonomia krizo, kaj la junularo ne povas vojaĝi al eksterlando kiel iam: iliaj gepatroj malriĉiĝis aŭ tute perdis sian laboron; ili volas kolekti monon por povi eniri la studon en iu fremda universitato (la aliro al la kipraj estas treege malfacila, pro manko de sufiĉaj postenoj).

Ne ekzistas, cetere, laŭ mia kono, malmultekostaj kompanioj (Ryanair, Easy Jet) kunligantaj Kipron kun Slovakio kaj ne ekzistas alternativo al aviadilo (vagonaro, aŭtobuso...). Kiu forlasas Kipron, tiu ja bezonas aviadilon. Ne estas alia ebla transportilo al eksterlando nuntempe. Se oni povus pagi al kelkaj elektitaj gelernantoj parton de la vojaĝkostoj aŭ almenaŭ de la partopreno al la E-studado, ili certe estus dankaj. Mi jam trovis 2-3 gejunulojn, kiuj bone lernas la lingvon kaj montras grandan intereson pri Esperanto kaj la E-movado. Mi kredas je ili, sed necesas, ke ili ĉi-somere partoprenu al E-evento, ĉar venontjare ili povus perdi entuziasmon, trovi novajn lecionojn, simple forgesi. Mi mem esperantistiĝis en 2002 kaj finis mian unuan kurson, sed poste dum kelkaj jaroj (ĝis 2009) tute forgesis pri Esperanto. Ni devas klopodi malebligi tion, ĉar mi restos sola aŭ kun 2-3 aktivuloj, kaj tio ne sufiĉos.

Roberto Pigo

## **NOVA KAMPANJO DE EEU – EVOLUINTAJ E-ASOCIOJ SPONSORU KRIZIĜINTAJN AŬ NOVAJN**

Ene de Eŭropa Komisiono de UEA evoluis la ideo ke EEU prizorgu novan kampanjon en EU. Nome nun, kiam fine ni havas E-movadon en ĉiuj landoj, estas evidente ke ekzistas granda evoludiferenco inter unuopaj landaj asocioj. Pluraj estas en bona stato kun forta aŭ relative forta movado kaj stabilaj financoj dum estas pluraj kiuj bezonas helpon, ĉar ili aŭ estas nesufiĉe evoluintaj aŭ en serioze kriza stato post periodo de florado. Tial la kampanjo celas inter la stabilaj kaj fortaj movadoj trovi tiujn kiuj pretas sponsori iun el la malfortaj movadoj kaj intense kunlaborante trovi kune manierojn kiel helpi por fortigi aŭ vigligi la movadon en la sponsorataj landoj.

Estas evidente ke la plej grandajn problemojn havas la movadoj en du insulaj landoj, Kipro, kiu startis kaj bezonas helpon por fortiĝi kaj Malto en kiu jam dum longa periodo ne renoviĝas la movado kaj aktivaj restas nur kelkaj maljunaj membroj. Simile estas en Grekio. Aliaj krizaj landoj estas Rumanio kiu dum jardekoj havis malpermeson de la Movado kaj Estonio, kiu simile al Malto jam longe ne havas novajn membrojn. En krizo krome estas kelkaj landoj kiuj iam havis tre florantajn movadojn kaj nun ili estas preskaŭ agoniantaj kiel tiu en Bulgario. Lamas ankaŭ la movado en Portugalio.

EEU startigis la kampanjon kaj feliĉe jam komence de ĉi tiu jaro ni sukcesis trovi kelkajn landoparojn. Francio decidis sponsori la Rumanian E-movadon, Belgio la Kipran, Italio la maltan kaj kun Germanio ni traktas aŭspicion super la estona movado. Ni serĉas aŭspicianton por Bulgario kaj por kandidata lando de EU Makedonio. Ankaŭ por aliaj menciitaj. Espereble ni baldaŭ trovos ilin kaj povos baldaŭ raporti pri la konkreta kunlaboro inter tiuj landoparoj.

Zlatko Tišljarić

## **EŬROPAJ ESPERANTISTOJ INICIATIS PROTESTON PRO LINGVA DISKRIMINACIO**

Komence de januaro malfermiĝis konkursoj por adresi projektojn al Eŭropa Komisiono rilate novan finacadon kadre de Erasmus+. Erasmus + estas granda fondaĵo de EU kiun administras Eŭropa Komisiono kadre de kiu oni financos projektojn pri lernado, junularo, sportoj kiuj disponos ĝis 2020 je 14 miliardoj da eŭroj. La konkursoj materialoj laŭ kiuj ĉiuj interesitoj povus vidi kaj kompreni la regulojn kaj kondiĉojn por la financado devus aperi en ĉiuj 24 lingvoj de EU, sed la konkurso aperis nur en la angla, laŭdire pro manko da tempo. La budĝeton por la periodo 2014-2020 EU finakceptis lastmomente kaj la diversaj servoj kiuj devas efektiviĝi ĉion ne havis tempon por difini ĉion kaj traduki al ĉiuj lingvoj. Tamen, la fakto ke tiel grava dokumentaro de kiu dependas sukceso aŭ malsukceso de projektoj prezentataj por la financado aperis nur en la angla prezentas efektivan diskriminacion por ĉiuj kiuj ne sufiĉe regas la anglan kaj temas efektive pri grandega kvanto da eŭropanoj. La unua rimarkis tion Esperantista Asocio Nitobe (kun la sidejo en Italio) kaj iniciatis la neceson pri protesto. Post diskuto en la listo de Eŭropo kaj Asembleo de EEU, la estraro de EEU decidis formuli protestleteron, kiun landaj asocioj de EEU sendu al eŭropaj parlamentanoj (ĉiu LA al sialandaj en sia lingvo). Efektive deko da landaj asocioj sendis la leterojn kaj kelkaj el ili ricevis jam reagon de siaj deputitoj en Eŭropa Parlamento, kiuj

promesis starigi adekvatan demandon en la Parlamento. Inter ili estas kelkaj italaj, polaj kaj francaj EU-parlamentanoj.

Jen la letero proponita:

Estimata Membro de la Eŭropa Parlamento;

Estas grava problemo rilate la novan EU-programon Erasmus +. Nome, ĝis nun ĝi estas publikigita nur en la angla lingvo kaj la tradukoj al la aliaj 23 oficialaj lingvoj de EU ne estos legeblaj antaŭ aprilo 2014. Sed la unua limdato por prezenti projektojn kadre de Erasmus +, estas la 17-a de marto 2014! Tiu situacio donas grandan, nejustan avantaĝon al denaskaj parolantoj de la angla lingvo, kiel Britoj kaj Irlandanoj. Temas pri tre granda monsumo en Erasmus +, pri pli ol 14 miliardoj da euroj, kaj tiun monon kontribuas ĉiuj EU-civitanoj, ne nur la parolantoj de la angla.

Do, mi petas vin altiri atenton al tiu situacio dum plensesio de la Eŭropa Parlamento, kaj postuli ke oni ĉesigu diskriminacion kontraŭ la plimulto de EU-civitanoj, kaj ke oni publikigu ĉiujn informojn samtempe en ĉiuj 24 oficialaj lingvoj de EU. Altestime.

Seán Ó Riain

## GRANDIOZA GIMNASTIKA TEAMO EN GERMANIO REKLAMAS ESPERANTON

Seppersona Esperanto-delegacio el Herzberg - la Esperanto-urbo partoprenis sabaton la 26-an de januaro grandegan prezentadon "Esperanto - Feuerwerk der Turnkunst" (Esperanto-Turneo 2014 - Artfajraĵo de gimnastikarto) en Braunschweig. Dum kelkaj semajnoj konstante pri tio informis la gazetaro, oni varbis per multaj radiostacioj por la "Esperanto-turneo 2014" kaj ofte oni skribis pri la "agnoskita mondlingvo Esperanto" kaj lingvo de la estonteco.



Jen kio okazis en la granda "Volkswagen-Halle" dum du trihoraj prezentadoj kun po 10.000 spektantoj. Ni akiris la novan kompaktdiskon (KD/CD) de Olivia Irmengard Grassner el Hanovro. Sur ĝi estas la "Titelsong". Fakte temas pri la Esperanto-himno, sed en moderna kaj alloga komponformo. Ni aĉetis ankaŭ modernajn T-ĉemizojn en tri diversaj koloroj kun la teksto "Esperanto-Turneo 2014". Ĉie pendis grandaj varbafiŝoj kaj ili disdonis la programkajerojn kun multaj informoj

pri la Esperanto-filozofio kaj kun la teksto de la kompleta Esperanto-himno en Esperanto kaj en germana traduko. Pli favorajn vortojn kaj frazojn pri Esperanto eĉ nia E-movado ne povus formuli.

Dum la komenco oni informis per laŭparoliloj, kial la nunjara temo (slogano) estas Esperanto. Same la prezidantino de la Gimnastika Ligo en Malsupra Saksio (Niedersächsischer Turnerbund) laŭdis publike la ideon kaj la oficialan lingvon Esperanto.



La juna talenta kantistino Olivia Irmengard Grassner el Hanovro detale klarigis, kial ŝi ŝatas Esperanton, kial ŝi kune kun Fabian Sievers novkomponis la Esperanto-himnon (titola kanto / Titelsong), kial ŝi kantas en la lingvo Esperanto kaj ke Esperanto estas la nova internacia "teamsento", kiu etosigas ĉiujn partoprenantojn. Tiam ni trovis filmfragmenton

kun la kantistino Olivia Grassner (kun vigla knabina koruseto) el Hanovro.

Bv. iom spekti kaj ĝoji mem:

<http://vimeo.com/83774499>

Ni ĝojas, ke tiu pozitiva kaj moderna "Esperanto-miraklo" estis kreita en nia "GEA-EMAS-regiono Malsupra Saksio". La firmao TUI kune kun NTB (Niedersächsischer Turnerbund) kreis la unikan Esperanto-Turneon 2014.

Certe milionoj aŭdis kaj legis eĉ plurfoje (tre pozitive) pri Esperanto kaj pli ol 200.000 vizitintoj en multaj germanaj urboj mem aŭdis kaj spertis tre pozitive pri Esperanto. Elstara reklamo!

Ofta ripetado efikas. Ĝuste pro tio ankaŭ ni, la GEA-Filio en Herzberg - la Esperanto-urbo, ofte informas la gazetaron, radio- kaj televidstaciojn pri la Esperanto-ideo kaj Esperanto-kulturagadoj. Ĝojigas nin, ke en la lastaj tagoj kelkaj novaj interesiĝantoj petis informon pri Esperanto kaj pri niaj lingvokursoj.

Petro Zilvar kaj Zsofia Korody

## **ESPERANTISTOJ LIGAS KAJ AKTIVIGAS LOKAN SOCION EKSTERMOVADAN**

Ĝus finiĝis internacia seminaria programo kadre de Partnera Projekto „Kiel instrui pri multkultureco de Europo?“ (2013-2015) financata de programo Grundtvig. La projektaj partneroj el Germanio, Hungario kaj Nederlando renkontiĝis en Pollando, kie kunordiganto – Centro de Interkultura Edukado en Nowy Sącz, preparis laŭteman 3-tagan riĉan programon pri popolaj kutimoj kaj pola tradicio kunligita kun Kristnaskaj Festoj.

La programo de la seminario montras ĝiajn valorojn: ĝian larĝan temaron realigitan de etnografiaj fakuloj, antaŭpreparajn metiejojn, intergeneracian partoprenantaron (infanoj, junularo, pliaĝuloj) kaj – laŭ mi la plej gravan atingon - aktivigon de loka civitanaro, klare



videbla en la programo kaj sur dekoj de fotoj konfirmantaj ke eĉ reprezentanto de loka administracio (estro de vilaĝo Łazy Biegonickie) mem portis grandan stelon dum la „Kolendado” tra urbaj stratoj en Nowy Sącz kaj en 4 apudsonĉaj vilaĝoj, kie marŝis la grupo de „Kolendantoj” ...

Speciale valora estis la arta programo, kiun realigis 2 eksterlandaj ensembloj: frisa

Kapriol' kaj koruso el Eger (Hungario) kaj ankaŭ pola Folkloro Ensemblo aganta ĉe Urba Kulturcentro en Nowy Sącz – SADECZANIE.

Nia seminaria programo estis direktita al loĝantoj de la urbo kaj kamparanoj en Łazy Biegonickie, Paszyn, Rdziostów, Świniarsko, Źeleźnikowa. En Metiejoj partoprenis ankaŭ infanoj el 2 bazaj lernejoj, junularo el 3 vilaĝoj kaj pliaĝuloj el Komunumo Stary Sącz kaj urbo Nowy Sącz. Arta kaj integriga seminaria programo montris al ĉeestanta publiko vivantan internacian lingvon, simpatian, amikeman, malfermitan socion de esperantistoj, kio rezultis per peto de junulara grupo tuj organizi E-kurson por ili!



Jen estas la maniero por allogi novajn esperantistojn – inviti homojn al realigado de komunaj programoj (ne necese pri Esperanto sed faritaj de esperantistoj) por diskonigi scion pri nia esperantista sociaro! Se ni faras tion bone kaj saĝe ni allogos aliajn al Esperanto. Demando nur estas: De kie ni provizu Esperanto-instruistojn?

En nia urbo instruas la lingvon volontule: infankuracisto, dentkuracisto, ekonomiisto, matematikisto, de tempo al tempo – pastoro... Kaj ĉiuj ili reprezentas jam trian aŭ eĉ kvaran generacion. Ne ekzistas pli grava tasko por la movado ol prepari junajn, klerajn, sindonemajn instruistojn de Esperanto.

Halina Komar



## PROGRAMO POR LA JARO 2014 DE LA FRANCA ESPERANTO-KASTELO GREZILJONO

- 19-26.04.2014: FRINGOJ, renkonto inter grupoj de Esperanto-lernantoj kaj iliaj instruistoj.
- 26.04.2014-04.05.2014: PRINTEMPaS, intensaj kursoj en 3 niveloj, internaciaj KER-ekzamenoj B1-C1. Rete: [gresillon.org/printempo](http://gresillon.org/printempo)
- 08-11.05.2014: Kantado de korusaro Interkant'
- 11-17.05.2014: Renkonto de rememoroj inter malnovaj esp-istoj kaj iamaj gastoj de Greziljono. Rete: [gresillon.org/s1](http://gresillon.org/s1)
- 29.06.2014-06.07.2014: Turisma semajno, tuttagaj ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro kaj rezidejoj de renesancaj artistoj. Rete: [gresillon.org/s2](http://gresillon.org/s2)
- 01-09.08.2014: Sennacieca semajno kun kursoj, ekskursoj kaj prelegoj, antaŭ SAT-kongreso. Rete: [gresillon.org/s3](http://gresillon.org/s3)
- 09-17.08.2014: Festa Semajno por infanoj, adoleskantoj, junuloj, familioj, SAT-Infankongreseto. Rete: [gresillon.org/s4](http://gresillon.org/s4)
- 24.10.2014- 01.11.2014: AŬTUNE, la komunaj ferioj por infanoj, familioj kaj geavoj.


Adreso: MCE, Grésillon, St. Martin d'Arce, 49150 BAUGE-EN-ANJOU, France

Retpoŝto: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

Retejo: [gresillon.org](http://gresillon.org)

Bert Schuman

## JUBILEA INTERNACIA JUNULARA SEMAJNO EN HUNGARIO



La 25-a Internacia Junulara Semajno (IJS) okazos de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto en Horány, 10 kilometrojn for de Budapeŝto (Hungarujo). Organizas tiun aranĝon Hungara Esperanto-Junularo. La temo de la ĉi-jara IJS estos "De la tradicioj ek al la futuro". La programo konsistas el plurtemaj prelegoj kaj aliaj aktivaĵoj, kiel lingvokursoj, diskuttrondoj, trejnadaj por aktivuloj, sportoj kaj ekskursoj. Kelkajn programerojn la partoprenantoj eĉ povas proponi. Skribu al [steleto@gmail.com](mailto:steleto@gmail.com)

Organiza Teamo de IJS

## ESPERANTO-KURSOJ OFICIALE ORGANIZATAJ EN UNIVERSITATOJ KAJ ALTINSTITUTOJ



Laŭ la lasta statistiko de januaro 2014 resume ekzistas 40 universitatoj en 19 landoj en kiuj oni oficiale instruas Esperanton.

Nombro laŭlande:

Aŭstrio: 1, Brazilo: 3, Bulgario: 1, Ĉeĥio: 1, Ĉinio: 13, Francio: 1, Germanio: 2, Hispanio: 1, Hungario: 1, Italio: 1, Japanio: 3, Korea Respubliko: 4, Kroatio: 1, Litovio: 1, Meksiko: 2, Nederlando: 1, Nikaragvo: 1, Pollando: 1, Usono: 1

La tuta listo kun detaloj pri ĉiu universitato kaj kursspeco estas ricevebla de la aŭtoro: [gepir.apro \(ĉe\) pandora.be](mailto:gepir.apro@pandora.be)

Germain Pirlot

### Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 31-an de januaro 2014

Redaktoro: Zlatko Tišljarić

En la numero kunlaboris: Maja Tišljarić, Zlatko Tišljarić, Halina Komar, Roberto Pigro, Seán Ó Riain, Bert Schuman, Germain Pirlot.

Kontakto: [ztisljar@gmail.com](mailto:ztisljar@gmail.com)

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

